# ESPERO KATOLIKA



I.K.U.E

JULIO 1953 No. 427 Jarkolekto 50

## ESPERO KATOLIKA

Fondita de Pastro Emile Peltier, Tours (Francujo) en 1903.

Oficiala Organo de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (I.K.U.E.)
fondita de Pastro Richardson en 1910 en Parizo.

**Prezidanto:** sac. A. Beckers, Kanaalstraat 9, **Overpelt-Fabriek** (Belgujo)
**Sekretario-kasisto:** S-ro L.G.C. de Jong, Utrechtseweg 81, VLEUTEN (Nederlando), Poŝtkonto 252792.
**Redakcio:** F-ino Truus Durenkamp, Kasperspad 91, DORDRECHT (Nederl.)

★

JARABONO: Ned. guld. 4,50 aŭ egalvaloro, pagebla al jenaj landaj

**REPREZENTANTOJ:**

| | | |
|---|---|---|
| **Argentino:** | S-ro W. Przewolka, Av. Forrest 1400-4°, BUENOS AIRES, | 22 pes. |
| **Aŭstrujo:** | S-ro W. Mudrak, Beatrixgasse 19/9, WIEN III-40, p.k. 105.713 | 30 ŝil. |
| **Belgujo:** | S-ro A. de Bosschere, Regentieplaats 3 ST. NIKLAAS-WAAS, p.k. 74260 | 60 frs. |
| **Brita Imperio:** | S-ro N. W. Vigar, Defrene Road 43, SYDENHAM-LONDON SE 26, | 7/10 |
| **Francujo:** | F-ino J. Le Boedec, 18 rue Ernest Cresson, PARIS-14, p.k. 5815-56, | 420 frs. |
| **Germanujo:** | S-ro H. P. Klein, Demrathkamp 28, ESSEN. p.k. 9040, | 5,50 DM. |
| **Hispanujo:** | S-ro Angel Llobet, Plaza des Martires 20, MANRESA, | 50 pes. |
| **Irlando:** | S-ro Lorcan O'hUiginn, Ardmore Farmhill Drive, Roebuck, DUBLIN, | 7/10 |
| **Italujo:** | S-ro A. L. Reni, Via Rovereto 6, VERONA, p.k. 9/16379, | 800 lire. |
| **Nederlando:** | Kasisto Nederlanda Katoliko, Krugerlaan 195, GOUDA, p.k. 121449 | f 4,50 |
| **Usono:** | S-ro P. Golobic, 17724 Grovewood Ave, CLEVELAND 19 (Ohio) | 1,50 dol. |

---

**Nekatolikoj,** kiuj deziras informojn pri la katolika religio povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, LOONOPZAND, Nederlando.

Tiu ĉi anonceto aperas regule en ĉiuj grandaj Esperanto-revuoj. I.K.I. sendas informojn kaj legaĵojn senpage: tio tamen kostas multan monon kaj tial ni ĉiuj devas subteni tiun laboron per mondonacoj aŭ abono je la dumonata gazeto „Vojo, Vero, Vivo". Abonprezo ned. guld. 1,20 aŭ 6 resp. kup. jare, al niaj reprezentantoj aŭ rekte al I.K.I. p.k. 268507.

JULIO 1953 No. 427 Jarkolekto 50

ESPERO KATOLIKA

## KIO ESTAS FELIĈO?

Estas fakto, pri kiu dubo ne povas ekzisti, ke ĉiuj homoj deziras esti feliĉaj. Ĉiuj homoj, senescepte, sopiras, sopiregas al feliĉo. Ĉirilate ili ĉiuj estas unuanimaj. Sed se temas pri la vojoj, sur kiuj oni povas serĉi la feliĉon, la opinioj tuj disiĝas. Unu opinius sin feliĉa, se li posedus grandamason da mono, alia soifas al gloro, tria esperas trovi la deziregitan en la brakoj de virino k.t.p. Kompatindaj homidoj! Ni ĉiuj serĉas la feliĉon, sed kiu el ni fakte ĝin trovis? Maltrankvile ni rapidas tien kaj reen, provas tion ĉi kaj tion, traserĉas ĉiujn angulojn de la mondo — tute vane! La granda feliĉo, pri kiu ni revadas de post la tagoj de nia infanaĝo, estas kaj restas neatingebla. Ĉiam ree ni devas ekkoni, kiel estas dirite en la konata kanto: „Tie, kie vi ne estas, tie estas la feliĉo"! De kie nun ĉi tiu daŭrema malsukceso? Jen la respondo: Ni homoj kutime havas tute eraran ideon pri la feliĉo. Ni opinias, ke ni estus kapablaj, silentigi la sopiregon de nia animo per nuraj bagatelaĵoj. Sed tio estas fundamenta eraro! Senlima, nemezureble granda ja estas la feliĉodeziro de nia koro, kaj nenio kreita, nenio finiĝema, nenio limigita estas kapabla, daŭre ĝin kontentigi.

Feliĉetoj, malgrandaj ĝojoj ekzistas pli ol sufiĉe, ekzistas eĉ du specoj de ili. La unua ampleksas tiujn ĝojojn, kiujn povas doni al ni ekzemple bona libro, bela pentraĵo aŭ muziko, pentrinda pejzaĝo, harmonia familia vivo k.t.p. Tiuj feliĉetoj, tiuj ĝojoj estas kvazaŭ ĉarmaj floretoj, kiuj kreskas laŭlonge de nia vivovojo, por plibeligi ĝin de tempo al tempo, sed ne pli. La dua speco de feliĉetoj verdire ne meritas tiun nomon, ĉar ĉi tiuj ĝojoj estas esence nenio alia ol primitiva kontentigo de brutecaj pasioj, senbridaj ekscesoj, unuvorte opio, kiu havigas al la homo por mallonga tempo la iluzion de granda feliĉo, sed nur por poste lin puŝi des pli profunden en la abismon de lia mizero. Ĉiam ree oni povas aŭdi, ke la granda poeto Goethe estis unu el la plej feliĉaj homoj, ĉar favora sorto lin dorlotis ĉiamaniere. Estis permesate al li, iradi sur la altaĵoj de la homaro. Ĉio, kion ajn la mondo povas prezenti al feliĉulo, estis al lia dispono kaj laŭvole li povis ĝin ĝui per longaj, profundaj tiroj. Sed je la vespero de sia vivo Goethe devis konfesi, ke li en sepdekkvin jaroj travivis eĉ ne kvar semajnojn de vera bonfarto. Ĉu ne malĝojiga bilanco pri tia grandioza, unika vivo?

Miloblaj spertoj pruvis kaj pruvas ĉiam ree jenon: La koro estas nur malgranda parto de nia korpo, sed ĝi postulas multon, multegon, ĉion! Kaj se ni posedus tutan la mondon, nia koro direktus sian sopiron al la steloj. Kaj se ni estus konkerintaj eĉ la tutan universon, la voĉo en nia brusto demandus maltrankvile kaj obstine: „Kio estas transe de ĝi?" Ni ne trompu nin mem! Ekzistas multe da feliĉetoj, sed feliĉo ekzistas nur unu! Ĉu ni espiras tion ĉi aŭ tion, la celo, kiun finfine ni ĉiuj aŭ konscie aŭ subkonscie volos atingi, estas ĉiam nur unu, ĉiam nur la sama, nome: Ripozado en la certa, neperdebla posedo de bonaĵo, kiu estas tiom granda, tiom perfekta, ke ĝi lasas neplenumita eĉ ne la plej malgrandan dezireton.

(Daŭrigota)

D-ro KARL FRIEDL.

★★★

## RENKONTO

En la arbaro iris
Knabino, kaj dum ŝi
De branĉo florojn ŝiris,
Sen ke ĝi peton diris
Sur ŝian ruĝan buŝon
Ŝin kisis papili'.

En la anĝel-orelon
„Pardonu" flustris ĝi,
„Mi havis nur la celon
Sorbeti flor-mielon
Kaj pensis, estas rozo
Buŝeto tiu ĉi".

„Nu do — pardonon prenu
Ĉi-foje", ridis ŝi,
„Sed aŭdu, ne revenu
Kaj en memoro tenu:
Ne floras ĉiu rozo
Por ĉiu papili'."

Karl Vanselow.

★★★

## I.K.U.E.

En la kadro de Nia XXIVa en Lourdes okazos la ĝenerala kunveno de I.K.U.E. je Dimanĉo, la 16a de Aŭgusto 1953 je la 10a horo.

TAGORDO:

1. Malfermo de la prezidanto.
2. Komunikoj.
3. Sekretaria Raporto pri I.K.U.E. kaj E.K.
4. Financa Raporto.
5. Diskuto pri la temo: „Ĉu la landaj ligoj devas esti tute memstaraj, ĉu ili estu dependaj de universala asocio".
6. Kie estoş la venonta kongreso kaj la ĝenerala kunveno? Oni proponas en Haarlem (Nederlando) dum la Universala Kongreso 1954.
7. Punktoj el la estraraj kunvenoj.
8. Demandoj, informoj kaj respondoj.
9. Fino.

L. G. C. de Jong
Ĝenerala — Sekretario de I.K.U.E.

La Sekretario de la L.K.K., s-ro A. Hasaers en Lourdes, tenas magazenon de memorigaĵoj en la Rue de la Grotte 72bis. Oni do povas aĉeti tie „esperantlingve".

★★★

## GRANDEGA MANKO DE PASTROJ EN AŬSTRIO

Pri tio emociige parolas la Viena Ĉefepiskopo Kardinalo D-ro Theodor Innitzer en en sia nunjara fastotempa EPISKOPA LETERO.
„Kelkspecaj zorgoj plenigas kaj premas la koron de la episkopo", jen liaj komencaj vortoj; kaj li daŭrigas: „Tiun ĉi fojon mi devas paroli pri speciale grava demando, pri la priplendinda manko de pastroj en nia ĉefdiocezo. Ĝi signifas animan mankon. La dua mondmilito ŝiris terurajn breĉojn en nian pastraron."
Kaj ni sciiĝas el tiu episkopa letero, ke militfalis 37 sekularaj kaj 31 ordenaj pastroj, plue entute 63 teologi-studantoj de ambaŭ kategorioj. Ne malmultaj aliaj estas konsiderataj „perdiĝintaj" dum la milito kaj verŝajne ne plu vivas. 21 pastraj

studantoj en tiuj jaroj ĉesis la porpastran studadon, 4 fariĝis profesie malkapablaj. Tiel oni devis komenci en la pastraj seminarioj en la jaro 1945 kun tre malgranda nombro da studantoj.
Pastriĝis en la jaro 1942: du; 1943: unu; 1944: neniu; 1945: du; 1946: kvar; 1947: du. Sed ankaŭ poste la nombro nur tre malrapide kreskis. 1948: naŭ, 1949: ok, 1950: dekkvar, 1951: dudekkvin kaj 1952 dekdu. 1953 pastriĝos dekkvin en la tuta ĉefdiocezo.
Nepraj sekvoj de tiaj faktoj: 18 paroĥoj momente ne okupitaj, same 94 laŭplanaj lokoj por kaplanoj de la ĉefdiocezo. Nek la pastra seminario kun 85 teologio-studantoj, nek la knaba seminario kun 199 atingis antaŭan nombron de edukatoj. Aliaj sekvoj estas la troaĝiĝo kaj troa ŝarĝiĝo de niaj animprizorgantoj. Krome en la jaroj 1946 ĝis 1952 mortis entute 300 sacerdotoj. Ĉi ĉio multe pensigas kaj kaŭzas premantajn zorgojn. Kio kulpas je tiu kvazaŭ katastrofa situacio? Ne nur estas la dua mondmilito kaj la necerteco de la postmilita tempo.
La kaŭzoj estas pli profundaj. Estas la krizoj de la lastaj jardekoj kaj la materialista spirito de la nuntempo, la ĝenerala maloferemo kaj ĝuemo.
Kio estu farata, por venki tiun grandan mankon?
Unue certe la preĝo; la preĝado por bonaj pastroj estas rimedo en tiu rilato. Dio mem devas doni la emon al la sankta pastra profesio.
Plue: Plej bona grundo por la pastra profesio estas la **bona katolika familio.** Ĝi devas esti helpata, akcelata resp. parte ankaŭ rekreata. Espero je pliiĝo de pastremuloj kaj pastriĝontoj estas la ne malmultaj junaj mes-servantoj, kies religia sinteno, fervoro kaj pieco, kiel oni povas konstati, nur estas imitinda. Ĝi estas lumeto esperiga en sufiĉe malluma situacio.
Dume ankaŭ venas helpo el eksterlando: Laŭ persona scio ekz. ĉe la pastroj Franciskanoj en Vieno nun estas ankaŭ du franciskanaj pastroj el Nederlando; jen nur unu ekzemplo.

Walter Mudrak, Wien

★★★

## LA MEMORO DE DU FAMAJ HOMOJ

La konata angla verkisto Stevenson ne estis praktika homo. Foje li faris vojaĝon al Parizo kun sia edzino. Li kunportis certan monsumon kaj krome ĉekon de cent sterlingaj funtoj. Sed post kelkaj tagoj li konstatis ke preskaŭ ĉio jam estas for. Kvankam nek li nek lia edzino povis kompreni por kio oni estus elspezinta tian grandan sumon, la fakto estis ke al la aŭtoro de „La Trezorinsulo" restas ankoraŭ apenaŭ sufiĉe por rekte reiri al Londono kaj ili do pakis siajn kofrojn. Reveninte hejme, la mirigita aŭtoro trovis la ĉekon inter siaj bagaĵoj: li nome tute forgesis enkasigi la monon kaj eĉ ne plu povis memori ke li posedis ĉekon!

Kiam admiralo Mountbatten alvenis en Toronto, li petis liston kun la nomoj de la oficiroj, ŝoferoj kaj soldatoj kiujn oni metos je lia servo dum lia restado en Kanadio, kun indiko de ĉies meritoj dum la milito kaj akiritaj dekoracioj. Post kiam oficiro alportis al li la liston, li ordonis malrapide laŭtlegi ĝin, dum kio li tre atente aŭskultis. De tiam la admiralo alparolis ĉiujn kiuj servas lin per ilia nomo kaj afable parolis pri iliaj faroj dum la milito.

★★★

## ENVENINTAJ DONACOJ OKAZE DE LA JUBILEO DE E.K.

| | | | |
|---|---|---|---|
| Anglujo | funtoj 2.2.2. | | f 22,35 |
| Argentino | 10 r.k. | | „ 2,— |
| Aŭstrujo | 260 ŝilingoj | | „ 36,40 |
| Belgujo | 200 frankoj | | „ 15,15 |
| Francujo | 4630 frankoj + 10 guld. | | „ 56,30 |
| Germanujo | 136,50 DM. | | „ 122,85 |
| Hispanujo | 50 pesetoj | | „ 5,— |
| Italujo | 16000 liroj | | „ 96,— |
| Nederlando | | | „ 141,10 |
| Svisujo | | | „ 10,— |
| Usono | 20,35 dolaroj | | „ 76,90 |
| | | entute | f 584,05 |

Tutkoran dankon al ĉiuj donacintoj. Kiu ankoraŭ volas kontribui ion, povas fari tion pere de la landaj reprezentantoj aŭ rekte al la redakcio de E.K. kaj kompreneble dum la Kongreso en Lourdes.

★★★

## HONORA KOMITATO de la Kongres-pilgrimo en LOURDES (Nia 24a)

Kardinalo Feltin, ĉefepiskopo de Paris.
Kardinalo Gerlier, ĉefepiskopo de Lyon.
Kardinalo Saliège, ĉefepiskopo de Toulouse.
Kardinalo Innitzer, ĉefepiscopo de Wien.
Monsinjoro Domeneche, ĉefepiskopo de Zaragoza.
Monsinjoro Théas, episkopo de Tarbes-Lourdes.
Monsinjoro Rodie, episkopo de Agen.
Monsinjoro Merick, paroĥestero de Lourdes.
Generalo Bastien, Paris.
Sinjoro Montillot, deputito de Haute - Saône.
Sinjoro Beguère, urbestro de Lourdes.
Sinjorino Lebondidier, konservatorino de la pirenea muzeo en Lourdes.

## SUDKOREA UNIVERSITATO BEZONAS ESPERANTO-LITERATURON.


Prof. Hengwi Hong instruas en la Chunggu Universitato en Taegu, Koreo, Esperanton kiel devigan fakon al 300 studentoj. Kiel lernolibron li uzas fotografian represon de „Tra la Jaro" en 2 vol. po 120 pĝ. verkita de Lucy E. Waddy laŭ direkta metodo, do tute en Esperanto. La universitata biblioteko urĝe bezonas esp. verkojn sed ne estas eble sendi monon al eksterlando. Tial prof. Hong petas helpon de ĉiuj samideanoj kaj volonte rekompencos la alsendon de libroj per ekzempleroj de „Tra la Jaro".

## NI GRATULAS!

La sekr.-kasisto de I.K.U.E., s-ro L.G.C. de Jong, kiu jam dum jaroj plenumas la funkcion de prezidanto de „Nederlanda Katoliko", dum la jarkunveno de nia nederlanda sekcio denove estas reelektita kun ĉiuj voĉoj senescepte.

★★★

## LA SINJORINO DE ĈIUJ POPOLOJ.




Tio iam estis Maria, la Dipatrino kaj tiun titolon ni denove volas revivigi en nia tempo, kiam regas malamo kaj malpaco, kristanoj estas persekutataj, abundas la katastrofoj kaj kreskas la malmoraleco En la pasinteco Maria ofte alportis la savon en samaj cirkonstancoj, tial ni ankaŭ nun alvoku ŝian intervenon.

La Papo daŭre instigas nin, kunlabori al mondfederacio, forta rimedo por reakiri la pacon inter la popoloj. Ni volas plenumi tiun deziron, ankaŭ per la nova, eklezie aprobata preĝnovado, kiu konsistas nur el ĉiutaga mallonga preĝo, kies tekston vi trovas dorsflanke de bildeto, montranta la Sinjorinon de ĉiuj Popoloj, starantan sur la terglobo. Kiel Kunsavantino kaj Propetantino ĉe sia krucumita Filo Jesuo-Kristo ŝi estas intime ligita kun la kruco, de kiu ŝi sendas per siaj manoj la gracon, la savon kaj la pacon al ĉiuj popoloj, kiujn oni vidas je ŝiaj piedoj kiel blankajn kaj nigrajn ŝafetojn, simbolo de la diverskoloraj rasoj. Ŝi estas la Patrino de ĉiuj senescepte kaj ni estas ĉiuj gefratoj, malgraŭ la diverseco de landoj, rasoj kaj lingvoj.

La preĝo tekstas jene: „Sinjoro Jesuo-Kristo, Filo de la Patro, sendu nun vian Spiriton sur la teron. Loĝigu la Sanktan Spiriton en la korojn de ĉiuj popoloj, por ke ili estu gardataj kontraŭ degenero, katastrofo kaj milito. La Sinjorino de ĉiuj popoloj, Maria, estu nia propetantino. Amen."

Bonvolu disvastigi ĉi tiun preĝon kaj mendi la bildetojn ĉe nia Libro-servo.

★★★

Antaŭ nelonge aperis en brajla preso vasta katalogo de esperantaj verkoj, troviĝantaj en porblindulaj bibliotekoj en Londono, Parizo, Hamburg, Leipzig, Marburg, Amsterdam, Hago, Grave, Kopenhago, Stockholm, Wien, Praha, Torino kaj Budapest. Kutimo estas ke tiuj bibliotekoj pruntedonas siajn verkojn senpage al interesiĝantoj en ĉiu ajn lando. Ĉar la poŝttarifoj por brajlaĵoj estas ekstreme malaltaj, la blinduloj do povas disponi pri multaj verkoj en Esperanto. ★★★

En Aprilo 1953 la Ministerio de Publika Servo de la brazila Ŝtato Rio Grande do Sul aranĝis en Porto Alegre Esperantokurson por maksimume 70 personoj. Tamen anoncis sin multe pli da lernemuloj, tiel ke multaj devas atendi sian vicon por sekvonta kurso. Ankaŭ en multaj aliaj urboj, ne nur de Brazilio, sed ankaŭ de diversaj aliaj sudamerikaj Ŝtatoj, abundas la kursanoj.

★★★

La internacia Esperanto-Muzeo en la antaŭa reĝa palaco, ekzistanta de 1928, estis fermata kaj konfiskata de la Gestapo en 1938. Post la milito oni ree malfermis kaj plivastigis ĝin kaj baldaŭ aperos katalogo de proks 400 paĝoj.
*Esperantistaj veteranoj* de antaŭ 1914 estas petataj sendi al la Internacia Esperanto Muzeo, WIEN-I, Hofburg, Michaelertor, unter der Kuppel, siajn nomon kaj adreson, foton kaj mallongan biografion, por la Panteono de la Esperanto Movado. ★★★

Prof. Sigfrid Svensson de la Universitato de Lund (Svedujo) aperigis en diversaj landaj kaj internaciaj Esperanto-gazetoj alvokon por ekscii pri la uzo de ĉevalviando kiel nutraĵo en diversaj landoj kaj kia estas la nuna opinio pri tio. Plue ĉu la diverslandaj registaroj faris leĝojn rilate la mortigon de hundoj kaj katoj. Li ricevis 90 leterojn el 35 landoj: tiamaniere Esperanto servas la sciencon. ★★★

Aperis franclingva broŝuro titolita „La eŭropa komunumo de Defendo kaj la problemo de la lingvoj" en kiu la kapitano-interpretisto L. Agourtino proponas solvon pere de Esperanto. ★★★

En Montevideo, Urugvajo, okazis interesa kaj bonege sukcesinta Esperanto ekspozicio antaŭ kelkaj monatoj. Oni jam nun preparas en la sama urbo multan pli ampleksan ekspozicion aranĝotan okaze de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en 1954. ★★★

Ni povus publikigi ankoraŭ centojn de tiaj komunikoj, sed bedaŭrinde la spaco mankas!

**Karl Vanselow:** *Nia Lingvo Esperanto.* Unua serio: Elektita poezio por deklamo kaj por kanto. Tri volumetoj enhavantaj entute 125 poemojn, seriozajn kaj amuzajn. Lingvo kaj stilo bonegaj kaj facile konpreneblaj. Specimenon vi trovos en ĉi tiu numero de E.K. Klara preso sen eraroj. Ni varme rekomendas. Eldonis: Berliner Esperanto-Verlag, Berlin. Prezo: po guld. 0,55; la tri vol. kune guld. 1,35. ★★★


**K.L.Immermann:** *La Karnavalo kaj la Somnabulino.* Epoko-Serio No. 11. Eld. Esp. Publ. Co. Heronsgate. Trad. Prof. D-ro A.E. Wohlthat. — Strangaj travivaĵoj de naiva, tro kredema kaj hezitema viro, sprite priskribitaj. Stilo kelkfoje iom malglata; gramatikaj malperfektaĵoj, precipe kiam temas pri la nerekta parolo. Tamen plaĉa legaĵo sur bela papero en klara preskaŭ senerara preso. Prezo f 2,30 ★★★

**F.Omelka:** *La Alaska Stafeto — Kaptitoj de la Glacirokoj.* Du streĉaj rakontoj originale verkitaj en Esperanto. La unua temas pri difteria epidemio en vilaĝo Nome, en la malproksima, sovaĝa Alasko. Kuracisto Welch estas senrimeda; nek ŝipo nek flugmaŝino povas alporti la bezonatan seron al la pro severega vintro tute izolita regiono. Telegrame mendita sero povas per aeroplano atingi Anchorage, kaj de tie kuraĝaj viroj kun sledoj tirataj de hundoj devas tage kaj nokte veturi sur glaciaj ebenaĵoj, trans neĝmontojn kaj laŭlonge de perfidaj abismoj. Kvar stafetoj faras alterne la trajekton ĝis la altvalora paketo alvenas post semajno. La dua rakonto priskribas la restadon sur glaciroko en sovaĝa svisa montaro kaj la savon de dek du homoj post frakaso de aeroplano.
Belege flua stilo, perfekta lingvo, bona papero kaj klara, senerara preso, tola bindo en kovrilo kun foto de unu el la ankoraŭ vivantaj stafetoj kun du el siaj hundoj. Eldonis: Esp. Publ. Co. Heronsgate. Prezo f 3,45. ★★★

Supre nomitaj verkoj haveblaj ĉe nia Libro-Servo. T.D. ★★★

*Llave del Esperanto.* La konata ŝlosileto en hispana lingvo, 3a urugvaja preso. Eldonis U.E.A. Enhavas la koncizan gramatikon, tabelon de la korelativoj kaj vortaron laŭ la Universala vortaro de Dro. Zamenhof.
Prezo f 0,32.

★★★




**POR NIAJ VIRINOJ.**

Ni montras ĉi tie novan, tre praktikan segileton por tomatoj. Fabrikita el plastiko ĝi segas la plej maldikajn tranĉojn, ne difektante eĉ tre molan frukton aŭ perdigante la sukon, kaj tute ne postlasas kromguston. Vi certe povos akiri ĉi tiun nederlandan produkton en ĉiulanda bona butiko por tre malalta prezo. ★★★

Vi certe ofte ne scias kien meti vian mansakon, vizitante iun familion, kafejon ktp. Ĉu vi scias ke ekzistas speciala hoko, kiun vi simple hokas al ekz. tablo, por pendigi vian mansakon ?

**Libertempo** ne estas tempo dum kiu vi devos efektivigi kiom eble plej grandan aktivecon, tiel ke revenante al via laboro vi sopirus al kelktaga restado en la lito por ripozi!
La unua celo de la libertempo estas ke vi poste revenu spirite kaj korpe refreŝiĝinta. Se vi troviĝas en interesa loko, rigardu la belajn konstruaĵojn kaj ĉirkaŭaĵojn, klopodante kiel eble plej multe ekscii pri ili. Zorgu akiri sufiĉe da ekzercado, da ripozo kaj precipe da dormo. Nur tiamaniere vi povos kolekti la necesajn rezervojn da fortoj kaj sano por la venonta longa vintro. ★★★

**Gastigado.** Mezaĝa fraŭlino petas dum- aŭ postkongresan restadon ĉe francaj geesperantistoj interŝanĝe por gastigado en Nederlando dum la estonta Kongreso. Leteroj al la Redakcio de E.K. ★★★

**Redakcia Leterkesto.** Ni kore dankas al ĉiuj, kiuj gratulis la novan redakcion. Speciale ankaŭ tiujn, kiuj ensendis artikolojn, gazetojn ktp. Kompreneble ni ne tuj povas lokigi tuj ĉion, ĉar ni ja provizore disponas pri nur malmultaj paĝoj. Se vi do ne vidas vian kontribuon en ĉi tiu numero, tio tute ne signifas, ke ni ne uzos ĝin. ★★★

**Laŭkutime ESPERO KATOLIKA ne aperos en Aŭgusto. La sekvonta numero venos la unuan de Septembro. Kopio ĝis la 10a de Aŭgusto ĉe la Redakcio.**

# L I B R O L I S T O .

*Nur por kleraj plenkreskuloj. Afranko $10\%$ alkalkulota. Prezoj en ned. guld.

| | | |
|---|---|---|
| ***Baekelmans,** Elektitaj noveloj | | f 0,80 |
| **J. Baghy,** La verda Koro, por progresantoj | | - 2,25 |
| * ,, Verdaj Donkiĥotoj | | - 2,00 |
| **P. Bennemann,** Miru, pensu, ridu ! | tolbind. | - 5,40 |
| ***Boudier-Bakker,** Surprizoj, trad. Tekla Flint, broŝ. f 3,75 | ,, | - 4,50 |
| **H. Bulthuis,** Idoj de Orfeo, 540 pp. nur bonaspektaj uzitaj ekz. | | f 1,90 |
| ,, Inferio, romano pri Ameriko | bind. | - 2,90 |
| ,, La Vila Mano, ilustrita | ,, | - 3.40 |
| **v.d.Cammen,** La Geedzeco, 78 pp. | | - 0,25 |
| **Sac. Carolfi,** La Padova Lilio (S. Antonio) ilustr. | | - 0,50 |
| ,, La Reformanto (S. Francisko de Asisi) ilustr. | | - 0,50 |
| ,, Preĝareto, la plej gravaj preĝoj, S. Meso ktp | | - 0,75 |
| **Chesterton,** La naiveco de pastro Brown, detektiva | bind. | - 3,10 |
| **Collodi,** Pinokjo, trad. Marchesi broŝ. f 1,50 | bind. | - 3,10 |
| **Degreef,** La radianta Lotuso | | - 1;25 |
| **Delsuno,** Formortinta Delsuno, rakontita de li mem! amuza | | - 1,25 |
| **Dickens,** La Batalo de l'Vivo, ilustr. | tolbind. | - 1,95 |
| **V. Dorno.** La Aventuroj de L.R.M. Sultulof la Xa, sprita | | - 0,55 |
| ***Fr. van Eeden,** La malgranda Johano, trad. H. Bulthuis | | - 1,20 |
| **Eola,** La amo en la jaro dekmil, 350 pp. | bind. | - 2,85 |
| **Edna Ferber,** Fanny, trad. B. Fabo. | tolbind. | - 3,10 |
| **J. Filip sac.,** Ĉeĥoslovakaj popolkantoj en Esp. k muziknotoj, ilustr. | | - 2,25 |
| ***Forst de Batt.,** La mistero de l'Sango (scienca) | | - 1,50 |
| **W. Fricke,** Universala legolibro | | - 1,25 |
| **Gerstäcker,** La Maro, rakontoj el marista vivo | bind. | - 2,10 |
| **Wilh. Hauff,** La Kantistino, trad. Wüster | | - 0,45 |
| ***A. Hekler,** Arthistorio, trad. Kalocsay, 146 fotoj, broŝ. f 7,— | bind. | - 8,00 |
| **Heroldo,** Mozaiko, div. rakontoj kaj skizoj | | - 0,30 |
| ,, Sub la Signo de l'Espero, rakontoj el Esp. vivo | | - 0,30 |
| **D.ro Kabe,** Unua Legolibro | | - 1,25 |
| **Kalocsay,** La Gramatika karaktero de la Esp. radikoj | | - 0,40 |
| ,, Dek du poetoj broŝ. f 2,— | bind. | - 2,50 |
| ***H. Kirk,** Taglaboristoj | bind. | - 2,90 |
| **M. Koenen,** La Sunkrono, novelo | | - 1,25 |
| ***Korolenko,** La sonĝo de Makaro, trad. M. Ŝidlovskaĵa | | - 0,40 |
| ***Limburg Br.,** Akbar, orienta romano | lukse bind. | - 3,50 |
| **Dan Lord S.J.,** Flirto, 48 pp. | | - 0,15 |
| **Ign. de Loyola,** Spiritaj Ekzercaĵoj | | - 0,85 |
| **Luycken,** Stranga Heredaĵo | bind. | - 2,90 |
| ,, Pro Iŝtar | tolbind. | - 4,50 |
| **D.ro Manders,** Esperantologio kaj Lingvistiko | | - 2,25 |
| ***Maxwell,** Anstataŭa Edzino | bind. | - 2,85 |
| **F. Molnár,** La Knaboj de Paŭlo-Strato | | - 1,20 |
| **Montfort,** La Mistero de Maria | | - 0,55 |
| **Müller,** Rembrandt, La Magiisto, k. 100 reprod. | bind. | - 5,00 |
| ***de Musset,** La du Amatinoj k. aliaj noveloj | | - 1,25 |

| | | |
|---|---|---|
| **G. Norway,** La Aventuroj de Marteno Drake | bind. | f 2,75 |
| **E. Pizzi,** La Floretoj de S. Francisko de Asisi | | - 0,70 |
| ,, La Protektanto | | - 0,25 |
| **E. A. Poe,** Ses Noveloj | | - 0,75 |
| ***D-ro Privat,** Vivo de Zamenhof | bind. | - 3,10 |
| **Raimund,** La Malŝparulo | | - 1,20 |
| **Randag C.s.s.R.,** Ĉu vi sciis tion pri la Framasonismo? | | - 0,25 |
| **Reitzel,** Aventuroj de Malspertulo | | - 0,45 |
| **Roche S.J.,** Nia Mesmistero | tolbind. | - 0,75 |
| **M. Sabbe,** Virina Koro | | - 0,65 |
| **Ŝal. Alejĥem,** Hebreaj Rakontoj | | - 0,75 |
| ***Schreiner,** Romano pri Afrika Bieno | | - 1,50 |
| **Shakespeare,** Antonio kaj Kleopatra | | - 1,50 |
| ,, Romeo kaj Julieto | | - 1,50 |
| ,, La gajaj Edzinoj de Windsor | | - 2,00 |
| **Sienkiewicz,** Noveloj, trad. Lidja Zamenhof | | - 0,75 |
| **J. Smeehuijzen S.C.J.,** La Katolika Librelektilo | | - 1,50 |
| **Storm,** Du Majstronoveloj | bind. | - 2,10 |
| **Stuttard,** La Virineto en Bluo | | - 2,30 |
| **van Sutter,** Potenco Infera, pri du demonposedataj infanoj | | - 0,75 |
| ***Szilagyi,** Dua Rapsodio, Tria Rapsodio | po | - 1,80 |
| ***Th Thijssen,** La nevenkebla ĝeno | bind. | - 4,90 |
| **Timmermans,** Kristnaska Triptiko, ilustr. | | - 0,50 |
| ***Turgenjev,** Elektitaj noveloj | | - 0,75 |
| **Uytterdijk,** S-ro Longkrurulo, k. 152 bildoj | | - 1,25 |
| **Vanweddingen,** Sub la vitra Kupolo, romano | | - 1,25 |
| **v. d. Vondel,** Jozef en Dotan, biblia tragedio | | - 1,25 |
| **Wannemakers,** Tutmonda Laŭdo, preĝlibro | | - 4,85 |
| ***H. G. Wells,** La Dormanto vekiĝas | bind. | - 3,10 |
| * ,, La Tempo-maŝino | | - 1,20 |
| **Wisemann,** Fabiola, il. 445 pp. bros. f 4,50 | lukse bind. | - 8,00 |
| **Wodehouse,** La Princo kaj Betty (humorista) | | - 1,20 |
| **Zamenhof,** Fundamenta Krestomatio, broŝ. f 5,50, | bind. | - 7,50 |
| **Vortaroj,** Plena Vortaro de Esperanto | tolbind. | - 11,50 |
| Schidlof. uitgebreid Zakwoordenboek | ,, | - 2,25 |
| Naŭlingva Etimologia Leksikono, L, Bastien | ,, | - 7,00 |
| Konversacia Vortaro, ŝerca difino de la vortoj | | - 0,20 |
| M. E. Biblioteko, 19 n-roj div. temoj, petu prospekton, | po | - 0,35 |
| Bildetoj de S. Ignacio de Loyola kaj de N.S. de ĉiuj Popoloj | po | - 0,03 |
| Multkoloroj reprod. de Ned. pentristoj, poŝtkartoj, 11 div. | po | - 0,08 |
| Esperanto Insignoj | | - 1,00 |

Tiuj ĉi kaj multaj aliaj titoloj, lernolibroj, esperantaĵoj ktp estas ĉe ni haveblaj.

**Mendoj kaj Pagoj:** por Nederlando al f-ino T. Durenkamp, Dordrecht, p.k. 214009. Por aliaj landoj al la landaj perantoj aŭ al la kasisto de I.K.U.E. en Vleuten, Nederlando, al kiu vi sendu pagateston por plirapidigi la alsendon de la libroj.